

STARTO

N-ro 2/2020 (275)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



*E-mentala naskiĝtaga kunveno 27. 5. 2020 en la parko Letná
(Prago)*

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:

Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, martinkova.sy@seznam.cz, — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz (retejo, muzeo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datum-bazo, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz (konferencoj, kongresoj, kunlaboro kun ĈEJ, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

Podzimní setkání v Muzeu esperanta

Český esperantský svaz a Esperantský klub Svitavy vás zve na Podzimní setkání v Muzeu Esperanta ve Svitavách. Akce se koná od pátku 4. do neděle 6. září 2020.

V rámci setkání navštívíme výstavu Cirkus v Litomyšli o životě a díle tamějšího esperantisty JUDr. Stanislava Bubeníčka. Pro zájemce se uskuteční prohlídka města Svitav včetně návštěvy Řezbářského memoriálu Aloise Petruše na místním stadionu. V muzeu budou promítány krátké filmy Pavla Kaščíka o esperantu a v esperantu. Jindřich Košťálek bude vyprávět o Brazílii.

V sobotu večer vystoupí v Ottendorferově domě Ivan Acher a jeho hosté z Národního divadla. Ivan Acher je český básník a skladatel, který složil hudbu k cca 150 divadelním a filmovým dílům a který byl nominován na cenu České filmové kritiky, Českého lva, Cenu české divadelní kritiky, Cenu Alfréda Radoka, Cenu DOSKY ... Je autorem opery Sternenhoch na motivy romaneta Ladislava Klímy Utrpení knížete Sternenhocha, jejíž libreto si nechal přeložit do esperanta a překlad zhudebnil.

Ubytování pro účastníky je zajištěno v Domově mládeže Obchodní akademie Svitavy, případně v Penziónu Bárta.

Podrobný program a přihlášku na setkání najdete na našem webu v sekci Akce: www.esperanto.cz.

Muzeum esperanta ve Svitavách je po nuceném uzavření z důvodu vládních opatření opět v provozu.

Otvírací doba muzea viz

www.muzeum.esperanto.cz.

POZVÁNKA NA ČLENSKOU SCHŮZI ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, z.s. (ČES),

kteřá se koná v jídelně Domova mládeže
a školní jídelny Pardubice, budova C,
Gorkého 350 v PARDUBICÍCH
dne 10. 10. 2020 od 9 hodin.

Program:

Zahájení, přivítání hostů, prezentace, kontrola usnášeníschopnosti, volba orgánů členské schůze (3-5členného předsednictva, zapisovatele a ověřovatelů zápisu)

Zpráva o hospodaření ČES

Zpráva o činnosti ČES a jejích organizačních složek

Diskuze ke zprávám o hospodaření a činnosti ČES

Různé

Usnesení

Závěr

V Bohutíně dne 9.6.2020
Mgr. Libuše Hýblová,
předsedkyně ČES, z.s.



Konference Českého esperantského svazu

Pardubice 17 – 20 říjen 2020

Vážení přátelé,

kvůli koronaviru se nám přípravy poněkud zkomplikovaly, zvláště po finanční stránce, avšak jsme přesvědčeni, že se konference uskuteční v plánovaném termínu. Přihláška bude jednak zveřejněna na internetových stránkách svazu, jednak bude klubům rozeslán zvací dopis. Kdo nemá internet, může se přihlásit přímo u pokladníka svazu (Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz) a vyžádat si bližší informace.

Na co se mohou účastníci těšit: návštěva blízké hvězdárny, představení svitavského divadelního souboru DOMA (Hrátky s čertem), představení nových knih. Kluby mohou představit svou činnost a pozvat na své akce. Počítáme i se vzdělávacími přednáškami. Změna programu je vyhrazena.

Na adresu L. Chaloupkové (Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, leonarda.ch@seznam.cz, tel. 732 415 094) zasílejte prosím zprávy o činnosti svých klubů a sekcí v období říjen 2019 – říjen 2020, aby mohla být sestavena zpráva o činnosti svazu a jeho organizačních složek za uplynulý rok.

Internetové přihlášky na obě naše podzimní akce najdete zde:

<http://esperanto.cz/svitavy2020>

<http://esperanto.cz/aligxilo2020>

Karaj geamikoj,

pro pandemio iomete komplikiĝis preparoj de nia asocia konferenco en Pardubice (17 – 20 oktobro 2020), sed ni kredas, ke ĝi realiĝos laŭ la plano.

Por la programo ni planas krom la propra asocia traktado ankaŭ viziton de proksima astronomia observejo, teatraĵon *Ludoj kun diablo* de junulara ensemblo DOMA el Svitavy, prezentadon de novaj libroj kaj planata aranĝoj, klerigajn prelegojn k.s.

La reta aliĝilo troviĝas je la adreso

<http://esperanto.cz/aligxilo2020>

aŭ oni povas skribi al la asocia kasisto

vratislav.hirs@esperanto.cz

Komence de septembro okazos ankaŭ Aŭtuna Renkontiĝo en Esperanto-Muzeo Svitavy (4 – 6 septembro 2020), kies retan aliĝilon oni trovas ĉi tie:

<http://esperanto.cz/svitavy2020>

Venis lastmomente:

Bela sukceso de UEA

Unuiĝintaj Nacioj uzas Esperanton por enketilo pri la estonta tempo de UN:

<https://un75.online/?lang=epo>

Nun estas nia morala devo diri al ili, kion ni pensas pri la mondo, pri UN kaj pri la dezirinda lingva politiko de UN mem.

Bonvolu reagi amase. Niaj respondoj rekte atingos UN-on.

Renato Corsetti

ALVOKO AL PERSONOJ KUN PEDAGOGIAJ SPERTOJ

Karaj gekolegoj, instruantoj, instruistoj!

Al ĉiuj, tra la sekciestroj tra la mondo

ILEI devas kunveni rete en julio anstataŭ ĉeesti ĉiuj kune en Kebekurbo kiel planite. Ni planas vekiĝon, ni planas **VEKI**, la 53-an Virtualan Esperanto-Konferecon ILEI.

Ĝi okazos en la sama semajno, tio estas de la 25-a ĝis la 31-a de julio 2020.

Jen vi povas vidi la programskizon ĉe <http://www.ilei.info/>. Vi povos vidi, ke ni estos kune dum 13 horoj tage, tage kaj nokte, tra la tuta mondo samtempe de Kalifornio ĝis Japanio.

En tiu programskizo aperas tri sesioj en ĉiu tago. La Tago pri **Pedagogio** okazos la 30-an de julio 2020. Ni planas la sesiojn tiel, ke ĉiu nova kontribuo komenciĝu je plena horo. Do post prezento, prelego, estos tempo por demandoj kaj debato. La sesio tria, nomita **Azia Mateno**, de tiu Tago pri Pedagogio, jam havas sian programon.

Ni alvokas al instruantoj, instruistoj petante, ke ili sendu filmeton kun prelego pri iu el siaj spertoj ĝis la 30-a de junio. Daŭro: 30 min. Sekvos demandoj kaj debato.

Ankaŭ povos esti kontribuoj en rekta enreta partopreno; por tio iu prelegonto povas skribi al Elisabeth Le Dru

<ledruelisabeth@gmail.com> dirante :

mi pretas paroli je tiu tago je tiu horo! Bonvenon! Por havi abundan debatan fazon, la formo *rekta enreta partopreno* estas preferinda.

La temoj de la prezentoj povas esti

1. Nova lernolibro, kiun vi uzas kaj pri kiu vi volus paroli, prezenti ĝin.
2. Preciza sperto dum instruado, kiu estis aparte interesa kaj povos interesi kolegojn.
3. Analizo de iu aspekto de nia lingvo kaj kiel instrui ĝin.
4. Ekzercotipoj, novaj inventaĵoj viaj.
5. Legolibro, kies legado aparte ravis vian klason.
6. Viaj bezonoj kiel Eo-instruisto
7. Viaj plej utilaj fontoj kiel Eo-instruisto
8. Via uzo de *Juna Amiko* en via instruado
9.

Do mi kalkulas je via kontribuo por nutri niajn kunvenojn, kiuj okazos sur nova platformo nun en konstruo, io kiel zomo aŭ skajpo.

Sinjorino Le Dru kaj mi estas je dispono por respondi viajn demandojn, se vi havas demandojn.

En atendo kaj kun GIGANTA antaŭdanko amike

Mireille Grosjean
prez de ILEI

Tradicia renkontiĝo netradicie

La homo feliĉas, kiam li havas amikojn. Ni, esperantistoj el Šumperk, ĉiujare en majo ŝatas inviti esperantistojn el la vasta ĉirkaŭaĵo kaj iliajn kamaradojn. De la jaro 1967 estas ĉi-jare la unua fojo, kiam ni devis tiun tradicion – kvankam malvolonte – rompi. Sur *Biskupská kupa* (Episkopa monteto) ĉe landlimo kun Pollando staras belvida turo kaj ĝuste tien veturis ni, tri esperantistoj, por ĝui panoramon kaj rememori lokojn de niaj renkontiĝoj. Samvoje ni vizitis anĝelan herbejon kun statuoj, du lignajn preĝejetojn, banlokon, du kastelojn, terman naĝejon, pump-elektrejon, tri muzeojn, speciale unikan muzeon de ŝoseoj, historiajn kriptojn.



Ni rememoris renkontiĝon sur *Červenohorské sedlo* (Ruĝmonta selo), kie iu esperantisto staris sur la tablo surkape dum la tuta tempo, kiam ni manĝis supon. En Jeseník ni denove imagis iaman plantadon de Esperanto-arbo en Priessnitz-banejo. Negranda aranĝo okazis eĉ en Rejvíz. Tiumomente ni jam alveturis al *Zlaté Hory* (Oraj

Montoj). Super la urbo staras belvida turo. Nuntempe mi jam komprenis, kial survoje al la turo kaj reen nejunaj esperantistoj uzadis vortojn, kiujn oni ne trovas en vortaroj! En *Zlaté Hory* estas nova skanseno, kie oni ellavas grajnojn da oro, kaj super la urbo nova pilgrimloko de Virgulino Maria Helpantino.

Karlova Studánka (Fontputo de Karolo) estas banloka vilaĝo kaj ĉi tie ni komencis nian 6-kilometran piediron preter la akvofaloj de *Bílá Opava* (rivero Blanka Opava) al la turisma kabano *Barborka*. Ĉe la kabano ni plantis Esperanto-arbon. Jen estis kelkaj el belaj unudirektaj aranĝoj. Ni aldonis ankoraŭ unu belvidan turon al nia ekskurso. Iam okazis ankaŭ transiroj de monto-krestoj *Ramzová-Červenohorské sedlo* kaj *Skřítek* (Koboldo)-*Jelení studánka* (Cerva fontputo)-*Sobotín*. Komune kun esperantistoj el Opava. Mi ĉiam klopodis, ke la alveturintaj gastoj ekkonu novajn lokojn de nia bela regiono!!!

Kvido



GRANDA ESPERANTISTO KAJ EKSA DIREKTORO DE UEA VICTOR SADLER FORPASIS

La 24-an de majo 2020, 83-jara, forpasis la eminenta esperantisto Victor Sadler. Sadler naskiĝis en 1937 en Britio kaj eklernis Esperanton en 1951, kiam li estis 14-jara. Li komencis uzi Esperanton, kiam li ekstudis en Kembriĝo, kie li fondis studentan Esperanto-klubon. Tra la jaroj membris en la klubo pluraj homoj, kiuj poste okupis gravajn postenojn en la Esperanto-movado. Sadler dum tiu tempo redaktis la informilon *La Studento* de STELO, la Studenta Tutmonda Esperantista Ligo, en kies estraro li aktivis.

Post la doktoriĝo pri fonetiko en 1962, li eklaboris fine de 1962 ĉe UEA en Roterdamo, por redakti la revuon *Esperanto*. Li redaktis ankaŭ *La Monda Lingvo-Problemo* inter 1968-1973 kaj okupiĝis pri la Biblioteko Hector Hodler. En 1968 Sadler fariĝis ankaŭ direktoro de la Centra Oficejo. Li transdonis la redaktadon de la revuo en 1974 al Simo Milojeviĉ. En tiu epoko li ankaŭ kunorganizis plurajn Universalajn Kongresojn kaj instalas en 1980-1981 la unuan komputilan sistemon de UEA. Ekde 1980 li laboris kiel ĝenerala direktoro de UEA ĝis demisio en 1983, post kiam li restadis en Brazilo. Reveninte al Nederlando en 1985, li longe laboris en la projekto pri aŭtomata multlingva tradukado pere de Esperanto, DLT (Distribuita Lingva Tradukado) de la nederlanda firmao BSO, ekde 1985 ĝis la emeritiĝo en 2002. En 1986 li estis elektita estrarano de UEA pri Financoj, sed li devis demisii la postan jaron pro sankialoj.

Li verkis *Budhisman terminaron* (1962), *Esperantan-sinhalan vortareton* (1963) kaj, kune kun Humphrey Tonkin, *Terminaron por tradukado de Esperanto-dokumentoj* (1976). Li verkis ankaŭ la poemajn librojn *Memkritiko* (1967), por kiu li ricevis la premion Arĝenta Sprono, kaj *Perversaj rilatoj* (2015). Sadler estis ankaŭ ano de la Akademio de Esperanto de 1970 ĝis demisio en 1983.

Entute temas pri multflanka aganto de Esperanto, en la literatura, en la lingva kaj en la organiza kampoj. Kun granda respekto kaj dankemo UEA adiaŭas unu el la grandaj figuroj de nia movado en la dua duono de la pasinta jarcento, kaj nome de la tutmonda esperantista komunumo kondolencas al la vidvino Maiumi Sadler-Hamada.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Max Kaŝparů en Ĉeĥa Radio

La 4-an de junio 2020 gastis ĉe redaktorino Tereza Kostková psiĥiatro, pastro kaj esperantisto Max Kaŝparů. Li parolis pri diferenco inter timo kaj respekto, pri sia amatora aktorado kaj ne forgesis ankaŭ mencii Esperanton kiel bonegan preventon kontraŭ Alzheimer-malsano. La cerbo estas muskolo kaj nesecas ĝin regule ekzerci.

Cirko en Litomyšl

La 27-an de majo 2020 membroj de Esperanto-klubo de Svitavy vizitis ekspozicion „Cirko en Litomyšl“, kiun ĉi tie aranĝis Regiona Muzeo en Litomyšl kunlabore kun la Nacia Muzeo. Ĝi estas ĝis nun la plej granda ekspozicio dediĉita al cirkoj.



Vizitanto povas vidi ĉi tie afiŝojn de ĉiuj niaj cirkoj ĝis nia tempo ekzistantaj, kostumojn, cirkajn helpilojn kaj figurojn, modelojn de cirkaj areoj kaj filmojn pri cirka medio. Ne mankas infana ludejo. Materialoj por la ekspozicio estas pruntitaj el multaj lokoj de la respubliko.



Tra la ekspozicio ĉiĉeronis por ni historiisto de la urbo PhDr. Martin Boštík kaj li subskribis niajn ekzemple-rojn de libro „Cirka mondo de Doktoro Bubeníček“, kiun li eldonis kune kun Hanuš Jordán. La libro enhavas leterojn, kiujn sinjoro Bubeníček skribis el siaj cirkaj vojaĝoj. Temas pri enrigardo al cirka mondo de interne. La ekspozicio nin riĉigis pri novaj scioj el la vivo de D-ro Bubeníček, kiu estis advokato persekutata de la reĝimo en la 1950-aj jaroj, sed ankaŭ esperantisto, verkisto, fotisto kaj filmisto.

Mi rekomendas viziti la ekspozicion (ĝis fino de septembro).

Libuše Dvořáková

František Kožík en Rajhrad

Alian ekspozicion pri verkisto, kiu estis ankaŭ esperantisto, preparis en Rajhrad Memorejo de Literaturo en Moravio, apartenanta al Muzeo de Brno-Regiono. Ĝi estas dediĉita al František Kožík (1909-1997), „verkisto, dramisto, scenaristo, tekstisto, dramaturgo kaj esperantisto, aŭtoro de romano La plej eminenta el Pierotoj.“ (18. 3. – 30. 12. 2020)

La memorejo mem indikis en la invito, ke Kožík estis esperantisto. Li engaĝis sin en la intermilita Verda Stacio en Brno kiel membro de aktora grupo TRAKT. La menciitan romanon esperantigis Jiří Karen, kiu preparis ankaŭ antologieton el aliaj verkoj de Kožík. Romanon pri Komenio tradukis Zdeněk Rusín, romanon *Super valoj mateniĝas* Josef Vondroušek.

-mm-

www.muzeumbrnenska.cz

Espera Stýblová

Iun tagon sonoris mia telefono. Aŭdiĝis: „Bonan tagon, mi estas Espera Stýblová“ kaj tiamaniere komenciĝis nia ofta komunikado inter mi kaj sinjorino Espera Stýblová. Neniam en la vivo ni vidis unu la alian, sed de komence inter ni estiĝis distanca amikeco.



Estas agrable babili kun ŝi. Same kiel mi ankaŭ ŝi ŝatas sekvi televidajn konkursojn. En unu el la konkursoj ŝi aŭdis, ke iu konkursantino devenas el Svitavy, kie troviĝas Esperanto-Muzeo.



Tiumomente ŝia atentemo kreskis. Ŝi rememoris, ke ankaŭ ŝia paĉjo Ferdinand Šilha kaj panjo Božena estis entuziasmaj esperantistoj. Paĉjo eĉ partoprenis en preparo de Universala Kongreso de Esperanto en Prago en la jaro 1921. Li kaj

lia edzino havis multajn eksterlandajn korespondantojn.

Kiam naskiĝis al ili filino, ili nomis ŝin laŭ sia hobbio – Espera. Kiam li anoncis tion al la eksterlandaj amikoj, tiuj tuj komencis sendadi al ŝi donacojn. Espera naskiĝis en Prago, sed kreskis en Luže apud Košumberk, kie ŝia paĉjo laboris kiel ekonomia direktoro kaj panjo en mikrobiologia laboratorio de tiam Hamza-sanatorio. Jarojn ĉi tie travivitajn Espera rememoras kun plezuro. Sed al Esperanto ŝi ne dediĉis sin.



Ŝi fariĝis fotografistino, edziniĝis al kolonelo Jiří Stýblo kaj post pluraj translokiĝoj ili fine ankris en Prago. Ĉi tie ŝi laboris en kultura komisiono, fariĝis direktorino de Popola (nun Kultura) Domo en Kbely, iom poste ŝi eniris Ĉeĥan Fonduson de Vid-Artoj kiel estrino de fako, kie ŝi prizorgis ekspoziciojn, interŝanĝojn de ekspozicioj, staĝojn de galeriistoj, estris ĉiujn pragajn galeriojn ĝis 1989. Ŝi meritis pri konstruado de Galerio por Ĉeĥa Arto en Bratislava. Kun sia amikino Květa Rafaelová ŝi kreadis ceramikaĵojn ĉe ŝi en Choceň.

Nur nun danke al televida konkurso ŝi eksciis, ke Esperanto, tiom amata de ŝia paĉjo, ne pereis, sed vivas plu!

Libuše Dvořáková

Skolitoj kaj homoj

Oldřich Arnošt Fischer

Observante niajn arbarojn kun brunaj, sekaj piceoj kaj pinoj mi rememoras la romanon „En paradizo de Ŝumavo“ („*V ráji šumavském*“) el la jaro 1893. Karel Klostermann (1848-1923), ĉeĥa verkisto, en sia romano priskribas la situacion, kiu estas tre simila al nuntempa skolita kalamito.



Bildo 1: La skolitoj *Ips typographus*.

Skolitoj estas la skarabetoj el la familio Curculionidae, kiuj evoluas en diversaj plantoj. La skolita specio *Ips typographus* (**Bildo 1**) evoluas precipe en piceoj kaj pinoj. Printempe, ekde fino de aprilo ĝis komenco de majo, adoltaj skolitoj, kiuj travintris sub ŝelo de la arbo, en kiu ili evoluis, atakas aliajn arbojn. Skolita masklo transboras arban ŝelon kaj en picea basto elmordas geedzan kamereton. Ĝi ne estas sola, ĉar ĝia kuniĝa feromono allogas aliajn masklojn. La arbo defendas sin per sia fluida rezino, en kiu multe da skolitoj

dronas. La masklo, kiu transvivis rezinan defendon de la arbo, ellasas allogan feromonon. Plej ofte du skolitaj femaloj al ĉiu masklo allogas. Post kopulacio en la geedza kamereto, ĉiu femalo boras unu longan patrinan koridoron.



Bildo 2: Skolitaj koridoretoj sub picea ŝelo.

Ĝi flanke de la patrina koridoro metas po unu ovo dekstren, po unu ovo maldekstren. Ĉiu elkoviĝinta larvo vorante la baston boras sian propran, pli mallongan koridoreton orte al la patrina koridoreto (**Bildo 2**). Post fino de larva evoluo la larvo elboras pupan kamereton, en kiu ĝi ĥrizalidas. La evoluo de *I. typographus* daŭras ĉirkaŭ dek semajnojn. Atakita arbo malfortiĝas kaj ofte mortas.

La skolitoj en romano de Klostermann en montaro Ŝumavo atakis la arbojn, kiuj la 26-an de oktobro 1870 estis damaĝitaj per ŝtormo. Nuntempe la arboj estas damaĝitaj kaj plimalfortigitaj kaŭze de seka klimato. En pasinteco „produktantoj de ligno“ plantis multe da unuspecajn arbarojn – piceo najbare de alia piceo, tial la skolitoj rapide disvastiĝas, multobliĝas kaj atakas eĉ sanajn arbojn. Rezultoj estas teruraj.

Granda amaso de mortaj arboj. Forstistoj kun laboristoj kaj volontuloj neniigas la arbojn kaj samtempe vendas malmultekostan lignon (**Bildo 3**). Same kiel en romano de Klostermann. Multe da homoj ĝojis pro konjunkturo: ili havis laboron, gajnis multe da mono. Aliaj homoj aĉetis malmultekostan lignon. Sed ĉiu konjunkturo iam finiĝas. Kio poste okazas? Ĉu oni denove plantos unuspecajn arbarojn por novaj generacioj de la skolitoj?



Bildo 3: Amaso da kalamita ligno.

Ĉiu lernanto de baza lernejo scias, ke la plej rezistaj kontraŭ la skolitoj estas la arbaroj kun miksado de koniferoj (piceoj, pinoj, larikoj) kaj foliarboj (fagoj, kverkoj, ulmoj, fraksenoj, karpenoj k. a.. Ĉu la forstistoj tion neniam lernis? Aŭ por ili la plej signifa estis la plano, kiom da ligno ili devis „fabriki“?

Klostermann en sia romano avertis: la mono feliĉon ne signifas. Ŝumavanoj, kiuj dum la konjunkturo kutimiĝis elspezi multe da mono, vivi en lukso kaj nur por konsumado, devis en damaĝita kaj denove tre malriĉa lando reveni al antaŭa, tre modesta vivstilo. Fino de vivoj de mamonemaj herooj de la romano, bienmastro Podhamerský kaj lia filino Rezla, estis tragika. Kaj kiel finiĝos vivoj de nuntempaj homoj, kiuj vivas por la konsumo?

FONDAĴO GRABOWSKI: NOVA KONSISTO DE LA JUĜKOMISIONO

La [Fondaĵo Antoni Grabowski](#) celas subteni la tutmondan Esperantan kulturon per premioj kaj subvencioj, precipe por originala kaj tradukita beletro, kaj per kuraĝigo de junaj verkistoj kaj artistoj.

Dum la Estrara Kunsido je 2020-05-02, la Estraro de UEA nomumis la membrojn de la juĝkomisiono kiu devas aljuĝi la premiojn de la fondaĵo dum la periodo 2019-2022. La komisionon prezidas Jesper Jacobsen. Ĝia sekretario estos Istvan Ertl kaj en ĝi ankaŭ membras Maritza Gutierrez.

La lasta aljuĝo de premioj el tiu ĉi fondaĵo okazis en 2018 en Lisbono, kaj ilin ricevis Sten Johansson, Gonçalo Neves kaj Bernhard Pabst.

Dum multaj jaroj gvidis la komisionon Ulrich Lins.

NOVA ESTRARO DE INSTITUCIO HODLER

La Estraro de UEA en marto 2020 renovigis la estraron de Institucio Hodler '68. En ĝi nun troviĝas: s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Nederlando (prezidanto); s-ino Loes Demmendaal, Nederlando (sekretario); s-ro Bert de Wit, Nederlando; kaj s-ro Rakoen Maertens, Belgio. La institucio finance subtenas movadajn instancojn kaj projektojn.

uea.org/asocio/komisionoj/institucio_hodler.

Gazetaraj komunikoj de UEA

MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE BICIKLO, 3 JUNIO 2020

UEA kaj TEJO gratulas siajn bicikle-majn membrojn kaj BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), faka asocio de TEJO, okaze de la Monda Bicikla Tago. Fiksita de UN en 2018, la Tago agnoskas la unikecon kaj flekseblecon de la Biciklo, kiu estas uzata de du jarcentoj, kiel simpla, atingebla, fidinda, pura kaj medifavora daŭripova rimedo de transporto.

Ĉijare Biciklista Esperantista Movado Internacia festas sian 40-jaran datrevenon. Ĝi estis fondita en 1980 por diskonigi E-on inter biciklantoj kaj biciklemon inter la esperantistoj kaj por aranĝi internaciajn biciklo-karavanojn. Efektive, BEMI okazigis multajn biciklajn karavanojn al internaciaj E-renkontiĝoj, unuavice al la IJK.

Aparte ĉijare, pro la korona viruso homoj en la tuta mondo remalkovris la avantaĝojn de la biciklo, kiel medi-amikema, senpolucia malkosta transportilo, kaj samtempe sana kaj efika ekzercilo.

En la lastaj jaroj biciklado pli kaj pli fariĝas populara sporta distrado, en kiu partoprenas homoj el ĉiuj aĝoj. Multaj urboj provizas lu-biciklojn, kiujn eblas facile kaj komforte preni kaj redoni post uzo ie ajn en la urbo. Aparte menciinda estas la varsovia servo, kiu alprenis Esperanto-nomon Veturilo. Tiukaze UEA instigas proponi Esperanto-nomon al viaurba bicikla servo.

UEA kuraĝigas siajn membrojn kaj simpatiantojn subteni la Fakajn Asociojn BEMI (biciklado), MELS (sporto), AVE (ekologio) kaj invitas tiujn asociojn kunlabori. bemi.tejo.org/tago/

Sternenhoch kaj kantoj proksime al morto

Omaĝo al nemorta lingvo, omaĝo al kanteblo de Esperanto

Sub ĉi tiuj titolo kaj subtitolo la 1-an de junio 2020 en Brno, en la korto de teatro Husa na provázku (Ansero sur ŝnureto) okazis koncerto de Ivan Acher, Jana Vébrová, Tereza Marečková kaj Vanda Šípová. Komence Jana Vébrová prezentis kvar kantojn ĉeĥlingve pri pendumito, droninto k.s., poste sekvis jam Esperanto, ne nur el Sternenhoch.

Montriĝis, ke ankaŭ en unu el la dramoj de tiu ĉi teatro estas kantata esperantlingva kanto, sed tiun mi ne tradukis. Eble Ivan Acher mem.

Ĉar eksterlandaj viraj kantistoj ne povis veni pro koronaviruso, oni prezentis kelkajn scenojn el Sternenhoch kantatajn de Vanda Šípová kaj Tereza Marečková. Unu vira voĉo estis aŭdata el reproduktoroj, laŭdire per skajpo. Alian scenon kun la bulgara rolanto de Sternenhoch Sergej Kostov ni vidis el filmo per video (estis tie pluraj ekranoj) – temis pri dialogo inter li kaj sorĉistino. Lian voĉon ni aŭdis el la ekrano, dum Tereza Marečková kantis vive en mikrofonon. Sekvis granda aplaŭdo, la kantistinoj devis trifoje reveni por riverenco.

La korto estis aranĝita tiel, ke seĝoj kaj tabletoj staris en tri vicoj kaj supre sur balkonoj povis sidi pluraj homoj. Sume 50-80 personoj, kiuj aŭskultis Esperantajn vortojn, nenion komprenis kaj ĝuis nur la kantantajn voĉojn. Dekstre estis bufedo, kie oni povis aĉeti vinon, bieron, limonadon, tial inter la seĝoj estis ankaŭ tabletoj.

Ivan Acher kun sia tekniko sidis sur balkono rekte kontraŭ la podio kaj ofte ŝerce komentis la okazadon sur la scenejo.

La unua spektaklo post la kvaranteno finiĝis sukcese.

Miroslav Malovec

Prof. Max Kašparů jubileas



Konata psikiatro, teologo kaj greka katolika pastro, aŭtoro de pli ol 30 libroj kaj portanto de plej multaj akademiaj titoloj en Ĉeĥio naskiĝis la 14-an de majo 1950 en Žirovnice.

En Esperanto-movado aktivas ekde 2009 (kvankam kun la lingvo mem li konatiĝis jam pli frue).

Tre gravas lia rekomendado de Esperanto en ĉeĥaj amaskomunikiloj, al kiuj li estas ofte invitata. Li estras rondeton *Montetaro* en Pelhřimov, kun liu li i.a. gastigis la 16-an ĈEA-Kongreson (2016). Krome li aktive kunlaboris en prezento de la migra ekspozicio en la regiono, instruis, prelegis en pluraj kluboj k.a. En 2010 li tradukis al la ĉeĥa la lernolibron *Esperanto per rekta metodo* de S. Marček. Samjare M. Blahuš esperantigis lian libreton *Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj*. Kunlabore kun M. Malovec aperis lia *Konciza psiĥiatria vortaro*.

Li aktivas en la Katolika Sekcio de ĈEA, kontribuas al la programoj de la konferencoj kaj al la gazeto [Dio benu](#), celebras mesojn en Esperanto. En 2020 la sekcio eldonis en traduko de M. Šváček lian lastan libreton *Dek paŝoj al ĝojo*. Pliaj informoj kaj ampleksa retligilaro pri li en la ĉeĥa lingvo aperis en Esperanto.cz en la [aktualaĵo de 19.5.2020](#).

-padv-

Rememore

Gravas ankaŭ rememori forpasintajn honorajn memrojn kaj iliajn neĝisvivitajn jubileojn.

110 jarojn havus jam aktorino **Alena Růžičková-Pavlinová** (1910 – 2003), teknikisto **Ludvík Fritsch** (1810-1989) kaj japana bohemisto **Kurusu Kei** (1910 – 2009).

100 jarojn atingus aktorino **Eva Seemannová** (1920-1999), „lanĉovano“ **Lada Bala** (1920-2006) kaj poeto **Jiří Karen** (1920-2000).

80-jarulo fariĝus blindulo **Jiří Vychodil** (1940-2012), kiu dum multaj jaroj gvidis nian sekcion de nevidantoj kaj redaktis gazeton *Aŭroro*.

[Sonregistraĵojn](#) postlasis ambaŭ aktorinoj, pri Eva Seemannová kaj ŝia [Verda Ĉaro de Julio Baghy](#) ekzistas eĉ speciala retejo. Ŝi postlasis ankaŭ interesajn tradukojn de Pigmaliono (G. B. Shaw) kaj Mariŝa (fratoj Mrštík). Ni memoras ŝiajn spektaklojn por unu aktorino, kiun nun daŭrigas Stanislava Hošková.

Sian retejon havas ankaŭ [Jiří Karen](#). Liaj poemaroj estas plejparte verkitaj ĉeĥe, sed Jiří Kořínek multajn esperantigis. Li mem esperantigis romanon de František Kožík *La plej eminenta el Pierotoj* kaj verkis poemaron *Kantoj de vaganto sur planedo Ĝojo Ĝojmalo*.

-mm-

INSTIGO KAJ UEA: SUBTENO AL EVENTA SERVO, KOMPUTEKO, TELEGRAM, WORDPRESS KAJ ALIAJ

UEA fariĝis la oficiala aŭspicianto de la **reta fonduso Instigo-Liberapay** kaj Yves Nevelsteen fariĝis komisiito de UEA pri reta agado. Instigo-Liberapay estas la paĝo de Fonduso Instigo en Liberapay (eo.liberapay.com/instigo), kiu arigas en si plurajn gravajn iniciatojn: ekde la retejoj Eventa Servo kaj Komputeko ĝis la laboroj por tradukado de Telegram kaj WordPress en Esperanton. Liberapay (liberapay.org) estas memstara neprofitocela platformo, kiu peras donacojn/monsendojn al projektoj aŭ homoj kaj cetere havas version tute en Esperanto. Fonduso Instigo estas fonduso starigita de belgaj esperantistoj por subteni Esperanto-agadojn, ĉefe tiujn, kiuj celas retan agadon, gviditajn de Yves Nevelsteen. Nuntempaj kundecidantoj de la Fonduso Instigo estas Valère Doumont kaj Jean-Pol Sparenberg. Nun UEA oficiale aŭspicias la fonduson per rekta monsubteno tra Liberapay kaj alvokas la tutmondan komunumon same [subteni la fonduson per Liberapay](#). Strategiaj retagadoj por Esperanto en la fonduso estas:

Eventa Servo (eventaservo.org): kunlabore kun Fernando Ŝajani, komisiito de UEA pri Eventa Servo, Yves kunzorgas pri evoluigoj de tiu senpaga servo de UEA kaj TEJO, kiu fariĝis unu el plej popularaj retejoj en Esperantujo. Via

subteno helpas teni la retejon funkcia kaj instigos konstante plibonigi Eventan Servon. Subtenu ĝin ankaŭ per aldono de viaj eventoj kaj registrado de via organizo kaj de vi mem kiel uzanto!

Komputeko (komputeko.net): en tiu tre grava prikomputila terminokolekto, gvidata de E@I (www.ikso.net), Yves kunordigas laborojn kaj instigas kunlaboradon. Menciindas la agado de la junulo Robin van der Vliet pri tutnova retejo por Komputeko: estas multe da laboro, kiun certe indas subteni!

Telegram (telegramo.org) kaj **WordPress** (wordpress.com): **Tradukado al Esperanto**. Robin estas ĉeftradukanto (al Esperanto) kaj disvastiganto de Telegram en Esperantujo. Yves transprenis la traduklaboron de WordPress de Cindy McKee. Gravaj instigi al ĉiam aktuala traduko de tiuj kaj aliaj platformoj, kiuj utilas al esperantistoj kaj montras la uzatecon de Esperanto. Komuna subteno de la komunumo estas nepre por tio.

Aliaj laboroj jam inkluzivitaj en la fonduso: **Wikipedio** (eo.wikipedia.org), partnere kun la Vikimedia organizo Esperanto kaj Libera Scio (ELiSo, esperanto.wiki), kun kiu UEA kunlaboras; **Eksterrete** (nevelsteen.info/eksterrete) kaj **Markolibro** (nevelsteen.info/markoj). Legu ĉe: eo.liberapay.com/instigo.

Vi certe konsentos instigi.

La fonduso celas akiri **50 eŭrojn semajne**. Se nur dek bonvolemaj esperantistoj akceptos subteni per po 5 eŭroj semajne, ni atingos tiun celon. Estas neniu dubo, ke tio eblas, kaj por kuraĝigi la komunumon UEA faris unuan donacon de **600 eŭroj** por la jaro 2020 kiel bazan kontribuon.

Ĉe eo.liberapay.com/instigo bonvolu legi kiel eblas al vi kontribui: per PayPal, Stripe, kreditkartoj kaj ĝiroj el SEPA-regiono. La donacoj estos uzataj por teni la menciitajn projektojn (retejojn, domajn, servilojn), provizi teknikajn plibonigojn (per akiro de aldona spaco kaj novaj iloj kaj uzopcioj en la projektoj), partoprenigo de ĉefaj kunlaborantoj en eventoj kaj kompensi per simbola honorario la ĉefkunlaborantojn. UEA estas tre fiera pri la atingoj de tiu teamo kaj pri la eblo tion instigi.

Donacoj al Instigo-Liberapay estas anonimaj. Se vi volas esti menciita kiel subtenanto en la jarraporto de Instigo, sendu pri tio mesaĝon al yves@ikso.net. Subteni la ĝeneralan laboron de UEA eblas ankaŭ per membriĝo en la Asocio: uea.org/alighoj/alighilo.

Gazetaraj komunikoj de UEA

MONDAFEST' 2020

En la 20-a de majo UEA oficiale anoncis la realigon de la **Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020)** kaj la **Virtuala Kongreso de Esperanto (VK)** (uea.org/gk/875). MondaFest' 2020 okazos inter la **20-a de junio kaj la 20-a de septembro 2020**, dum la VK okazos inter la **1-a kaj 8-a de aŭgusto 2020**. eventaservo.org/e/mondafest2020.

06 jul-10 jul - [NASK 2020](#) 2-a parto
11 jul-18 jul - [76-a IJK](#)
18 jul-26 jul - [SES](#) kaj [SEP](#)
25 jul-31 jul - [Virtuala ILEI-Konferenco](#)
01 aŭg-08 aŭg - [Virtuala Kongreso \(VK\)](#)
09 aŭg - [MondaFest' 2020](#): Indiĝenaj Popoloj
15 aŭg - Paralela Universo
20 aŭg-20 sep - Tutmonda Arbo-plantado
12 sep - [8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj](#)

Virtualaj aranĝoj el Písek

Anstataŭ ne okazinta aprila renkontiĝo en Ústí nad Labem, kunlabore inter la kluboj de Písek kaj Ústí kaj la familio de Miroslav Smyčka, estis pretigita por ĉiuj interesitoj almenaŭ virtuala video-promeno tra la urbo sub la titolo [Bonvenon en la urbo Ústí nad Labem](#) kaj programo [Rememore pri Miroslav Smyčka](#).



Krome estis ekita serio "Kvar konataj kantoj por komuna kantado ĉe virtuala bivakfajro". [La unua parto](#) entenas kantojn registritajn en Skokovy en 2015, [la dua parto](#) kantojn laŭ la kantaro "Kantu kune" el 1991. La tekstojn eblas komforte sekvi sur la ekrano. En la [kluba videokanalo](#) eblas spekti entute 95 videojn.

En junio klubanoj kun la gastoj vizitis Torfregionon de Soběslav kaj la Regionan Muzeon en Písek, pri kiuj aperis dulingve priskribitaj fotoalbumoj fine de la paĝo Sablo.rajce.idnes.cz. Nenio kompreneble povas anstataŭi rektan personan rekontiĝon. Tamen virtualaj aranĝoj povas mildigi periodon de nia disiĝo kaj ili laŭplaĉe senpage viziteblas iam ajn de iu ajn en la mondo. Bonvenu ankaŭ vi!

-padv-

TEO kaj UEA

La 21-a de majo estas deklarita de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Tago de Teo. Post akvo la plej ofte uzata trinkaĵo en la mondo estas teo. Te-rikolto kaj -produktado povas esti la plej grava vivrimedo por pluraj neriĉaj familioj en multaj landoj. Te-industrio provizas formalan laboron por multaj homoj, inkluzive signife multe da virinoj, en urboj kaj vilaĝoj, kio gravas des pli en foraj malriĉaj regionoj. Krom tio, estas science pruvite, ke teo danke al kontraŭinflama kaj antioksidanta ecoj estas utila por sano: bonkvalita teo helpas por bona funkciado kaj kondiĉo de digesta sistemo, koro, haŭto, renoj kaj dentoj.

Tiel Unuiĝintaj Nacioj per deklaro de specifa tago por teo atentigas la homaron pri la graveco de teo en la monda batalo kontraŭ mizero. La tago ankaŭ pensigas te-produktantojn kaj te-ŝatantojn pri ekologiaj problemoj: teo povas kreski nur en specialaj kondiĉoj, kiuj nun de loko al loko ŝanĝiĝas pro la klimat-problemo. Pluraj agrikulturaj areoj esencaj al te-plantado ne plu estas tiaj, kiaj ili estis antaŭ kelkaj dekoj da jaroj, tiel ke te-komunumo devus aktive subteni politikojn por protekto kaj gardado de la naturmedio, speciale laŭ la direktoj de internaciaj rekomendoj kiel la Celoj por Daŭrigebla Evoluigo.

Fine estas egale grava la kultura aspekto ĉirkaŭ teo. De jarcentoj, eĉ jarmiloj, ĝi estas parto de tradiciaj kulturoj en multaj landoj en pluraj kontinentoj: Ĉinio, Barato, Indonezio, Japanio, Kartvelio, Irano, Argentino, Vjetnamio, Turkio, Anglio, Hispanio, Svislando, Azerbajĝano kaj multaj aliaj tenas profundajn kulturajn rilatojn kun teo. Samtempe ĝi estas ilo por konekti ĉiujn tiujn kulturojn per komunaj aŭ similaj trajtoj, sociaj kaj familiaj, tiel ke per teo individuoj ĝentile heredas kaj grupoj nature konservas la kulturen diversecon de la mondo, la edukajn valorojn por infanoj kaj la socian estimon pri kulturo, historio kaj ekologio.

Teamanta Esperantista Organizo (TEO) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA) kunlaboras por diskonigi al homoj en pli ol 120 landoj tion, kion teo reprezentas, kun la celo antaŭenigi la valorojn de paco, internacia kunlaboro kaj daŭrigebla evoluigo, konstante atentaj al la Tagordo 2030 de Unuiĝintaj Nacioj.

Rezolucion de la Ĝenerala Asembleo de UN pri la Internacia Tago de Teo eblas legi en 6 lingvoj ĉe <https://undocs.org/A/C.2/74/L.6/Rev.1>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA 873



Svitavy en rekta transmisiono al la tuta mondo

Sabate la 16-an de majo 2020 esperantistaj amantoj de teo festis la 1-an Internacian Tagon de Teo, kiu estis deklarita de Unuiĝintaj Nacioj por la 21-a de majo. Tiucele realiĝis videokonferenco de teo-amantoj, kiuj komune rememoris kaj rakontis pri inaŭguroj de ekspozicioj kun temo „Teo, Amo kaj Mondo“, pri kulturado de teo en unuopaj landoj, pri te-ceramikajoj en Japanio, pri te-kulturo inkluzive de te-ceremonio ekzemple en Japanio kaj Ĉinio.

Programo estis tre riĉa kaj la konferenco pasis en amika etoso. Partoprenis entute 80 esperantistoj el 30 landoj de ĉiuj kontinentoj. La rektan transmision gvidis redaktoro de Ĉina Radio Internacia Zhang Pink. La partoprenantojn salutis inter aliaj ankaŭ konata verkistino kaj direktorino de Universitato de Teo Profesorino Wang Xufeng el Ĉinio kaj Profesoro Amri Wandel, estrarano de UEA.



Al organizantoj de la ekspozicio apartenas ankaŭ la Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy. Tial enkadre de la videokonferenco niaj klubaninoj Jindřiška Dubinová kaj Li Huang prezentis agadon de nia klubo, montris fotojn de paneloj el la ekspozicio kaj de vizitantoj de la ekspozicio. La parto elsendata el

Svitavy estis unu el la plej longaj kaj buntaj. Inter unuopaj riportoj kantis rekte ekzemple grupo Sepa Asorti el Litovio kaj kantistino Anjo Amika el Hungario.

Libuše Dvořáková

VIRTUALA TEO-FESTO

Ĝuu aroman teon kaj celebru la unuan Internacian Tagon de Teo, nome la 21-an de majo, dekretitan de Unuiĝintaj Nacioj.

Tempo: 19:00 – 21:00 laŭ la pekina tempo, la 16-a de majo, 2020.
Loko: Skajpo (Skype)
Programo: Ekspozicio "Teo, Amo kaj la Mondo"
Prezento de diverslandaj teaj kulturoj kaj kutimoj
Rakonto pri tea vivo
Koncerto "Teo kaj Amo"

Lisa (Ĉinio), Petro (Germanio), Fabio Bettani (Italio), Rafael Henrique Zerbetto (Brazilio), Guo Wengiang (Ĉinio), Huang Li (Ĉinio), Olga Shilaeva (Rusio), Hideko Hujimoto (Japanio), Orlando E. Raala (Usono), Zsófia (Germanio), Chen Hongling (Ĉinio)



Dankemo akcelas feliĉon

La nuna kvaranteno ĉiutage postulas gravajn decidojn. Ĉu ni kapitulacas al timo kaj antaŭtimas estontecon, aŭ ni prenas nian mensan sanon al niaj propraj manoj kaj ni ellernos esti feliĉaj malgraŭ la cirkonstancoj? Ĉu vi scias, ke tio eblas, ellerni esti feliĉa kaj preni la vivon de la flanko pozitiva?

Sufiĉas konatiĝi kun simplaj teknikoj, kiuj aperas de la pozitiva psikologio. La arta iniciato Ĉeĥa Dankemo publikigos dum tri sinsekvaj semajnoj tri alvokojn, kiuj celas ligi la tutan respublikon kaj instrui tiujn teknikojn al la plej gravaj grupoj de homoj, por ke ni komune kreu pozitivan ondon.

„Dum la dudek lastaj jaroj la pozitiva psikologio konvinke montris, ke la kvalito de vivo kaj persona feliĉo ne dependas de eksteraj cirkonstancoj. Tio estas la formo de pensado, lerteco, kiun oni povos ellerni kiel sporton aŭ ludi muzikilon. Pro tio ni venas kun tri simplaj alvokoj, kiujn povas plenumi ĉiu el ni, ek de infanoj ĝis olduloj. Tio estas teknikoj, kiuj aperas el ekkonoj de la pozitiva psikologio, kaj ili estas science konfirmitaj, ke ili plibonigas la vivokvaliton kaj alportas en la vivon pli da feliĉo,“ diras la aŭtoro de la iniciato Ĉeĥa Dankemo Jakub Jahn.

La unua vokado nomiĝas „Tri feliĉoj“ kaj baziĝas sur la glora eksperimento de Martin Seligman, unu el la plej elstaraj nunaj psikologoj. Li simple postulis de pacientoj kun grava depresio unu simplan taskon – skribi ĉiutage tri pozitivajn faktojn. Post du semajnoj oni denove mezuris kaj ĉe 94 procentoj el ili konstatiĝis frapa pliboniĝo, kompare al rezultoj de kuracado pere de psikoterapio kaj kontraŭdepresiaj medikamentoj. „En

nia unua vokado ni provos inspiri multajn ĉeĥinojn kaj ĉeĥojn, por ke ili dum tiu komplika periodo komencu observi pozitivajn realaĵojn kaj poste ili dividu ilin kun aliaj. Tiel ni povos helpi al ni mem kaj al aliaj,“ aldonas Jakub Jahn.

La iniciato Ĉeĥa Dankemo celas ligi la ĉeĥan socion kaj disvastigi la konscion pri malkovroj en la kampo de pozitiva psikologio, helpe de kiuj ĉiu el ni povos plibonigi sian vivokvaliton. Ĝi baziĝas sur dekdu strategioj de la mondkonata psikologino Sonya Lyubomirska, per kiuj ni povas cele plibonigi nian vivon. Al ili jam apartenas cellinia laboro kun la dankema sento.

Pro tio unu el la ĉefaj celoj de la iniciato Ĉeĥa Dankemo estas malfermi la plej grandan ekspozicion de leteroj de dankemo en la mondo, en kiu ĉiuj loĝantoj de Ĉeĥio povos kunagi. Sufiĉos skribi leteron, en kiu oni priskribas almenaŭ tri aferojn, pro kiuj oni nun estas dankema, poste oni forsendos la leteron al la organizantoj. La malfermo de ekspozicio Ĉeĥa Dankemo estas planita por la festo de ŝtato la 28-an de oktobro 2020.

Jaroslava Malá

Lančov 2020

19.7.-1.8. První etapa: **Alenka v říši divů**

2.8.-14.8. Druhá etapa: **Starověký Egypt**

14.-16.8. **Setkání bývalých táborníků**

Angličtina, němčina 5750 Kč / 5390 Kč*

Esperanto 4750 Kč / 4390 Kč*

(*druhý běh je kratší)

let.lancov@seznam.cz

<https://www.set-lancov.cz>



ĈEJ AKTIVAS 2020/01

(oficiala informilo de ĈEJ redaktata de Václav ZOUZALÍK)

Je la 14-a de septembro 2019 okazis en la Esperanto-muzeo en Svitavy inaŭguro de ekspozicio pri 50-jara datreveno de restarigo de Esperanto-movado en hodiaŭa Ĉeĥio kaj pri ĉeĥia junulara E-movado. Post la inaŭguro okazis planto de arbo kaj prelegoj pri junulara E-movado kaj pri ĉi-jara IJK en Slovakio.

Ekde la 17-a ĝis la 20-a de oktobro okazis en Brno jubilea Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. ĈEJ prezentis tie la IJK-on 2019 en Slovakio kaj solene salutis la kongresanojn.

Pluraj membroj de ĈEJ festis alvenon de nova jaro dum Junulara Esperanto-Semajno en Karlovo, Pollando, kiun tradicie kunorganizas Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj.

Je la 10-a de februaro okazis la unua Praga Esperanto-Meetup. Okazis diskutoj kun la alvenintoj kaj tabloludado. Pliaj informoj je:

<<https://www.meetup.com/Prague-Esperanto-Meetup/>>.

La ĉi-jara Centrejo (la renkontiĝo de ĈEJ) okazos somere aŭ aŭtune en Brno. Precizaj datoj kaj pliaj informoj pri la programo kaj kotizoj venos baldaŭ.

Internacia Junulara Kongreso okazos ĉi-jare pure en Interreto. Partopreni ĝin do povas esperantistoj de ĉiuj landoj sen neceso vojaĝi. La datoj dume ne ŝanĝiĝis kaj restas ekde la 11-a ĝis la 18-a de julio. Pliajn informojn eblas trovi je <<https://ijk2020.tejo.org/>>.

Somera Esperanto-Studado 2020 ankaŭ okazos Interrete dum la sama semajno, kiel planite, t.e. ekde la 18-a ĝis la 26-a de julio 2020. La unua SES en Ĉeĥio okazos en 2021. Pliajn informojn eblas trovi je <<https://ses.ikso.net/2020/eo/>>.

Universala Esperanto-Asocio decidis ebligi senpagan elŝuton de sia revuo Esperanto. Elŝuteblaj estas la maja numero 2020 kaj ĉiuj numeroj pli malnovaj ol unu jaro ĝis la jaro 2002. Sufiĉas iri al

<<https://uea.org/revuoj/esperanto/>>.

Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <<http://mladez.esperanto.cz/>>

ĈEJ AKTIVAS 2019/03 fare de Václav ZOUZALÍK estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonda <<https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/>>.

Václav Zouzalík

Esperantista klubo en Brno en novan klubejon

Ekde septembro 2020 la esperantistoj en Brno kunvenos en nova klubejo en la strato Křenová 57 ĉiun MARDON (ne plu merkrede!), nur la horoj restas samaj (18-19 h).

La klubejo estas senbariera kaj troviĝas du tramstaciojn de la ĉefa fervoja stacidomo.

Regiona Esperantista Ligo

Kvankam la Regiona Esperantista Ligo estis menciita en Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio de St. Kamarýt, marĝene ankaŭ en aliaj historiaj materialoj, tamen pri ĝi oni scias nur malmulte malgraŭ daŭre publike videblaj memoraĵoj – la monumetoj en Ostrava kaj Bohumín. La pasinta numero de Starto informis pri artikolo publikigita en la prelegaro Acta Historica de Silezia universitato en Opava (la informo erare anoncis universitatan ĵurnalon), kiu estis dediĉita al la historio de tiu ĉi regiona asocio. El la artikolo ni alportas bazajn faktojn.

La 13-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Prago en la jaro 1921, estis por la movado – kiu en tute juna respubliko, kies gravaj instituciaj problemoj inkluzive de la landa Esperanto-movado ne estis ankoraŭ plene ĝisolvitaj – grava sukceso. Ĝi estis ĝis tiu tempo la plej nombra esperantista renkontiĝo kaj danke al oficiala subteno de la ŝtato, kies reprezentantoj la kongreson ĉeestis kaj diversaj kongresaj eventoj – ekzemple fondiĝo de S.A.T, la unua teatra prezentado en Esperanto (estis tio Nokto en Karlův Týn de J. Vrchlický en la teatro en Vinohrady) ktp., vekis la kongreso inundan intereson pri la internacia lingvo, kio fine speguliĝis en apero de vico da novaj organizaĵoj de interesuloj kaj kresko de novaj uzantoj de Esperanto. Ĉeĥoslovakio fariĝis preskaŭ „Esperantista grandpotenco“, ekzemple en la jaro 1928 laŭ la Jarlibro membriĝis en UEA el Ĉeĥoslovakio 1361 esperantistoj, kaj nombro de delegitoj de UEA inter la

jaroj 1920 kaj 1926 kreskis kvinoble. En la regiono, kiun estonte esperantistoj nomis Ostrava-Těšín funkciis en 1920 du delegitoj, sed post ses jaroj jam dudek unu. Por pli bone kompreni tiun fakton mi menciuj, ke ĝis la jaro 1924 nuntempaj urbopartoj de Ostrava estis memstaraj komunumoj kaj en kelkaj havis UEA sian delegiton – Přívoz (origine Oderfurt), Vítkovice, Mariánské Hory, Slezská (origine Polská) Ostrava ktp. Baldaŭ tiuj delegitoj kaptis ideon pri komunaj renkontiĝoj cele solvi problemojn de efika kunlaboro en propagando de Esperanto, varbado de novaj esperantistoj kaj membrigo de ili en la asocion. La unua tia renkontiĝo okazis 9. 5. 1926 en Slezská Ostrava kun ĉeesto de naŭ delegitoj. Sekve la renkontiĝoj okazis preskaŭ ĉiumonate, kutime en iu el lokoj de sidejo de UEA-delegito, sed ofte ankaŭ ekster ili. Mirege ankaŭ sur kelkaj montopintoj de proksima Beskida montaro, tuj la dua renkontiĝo okazis la 6-an de junio 1926 sur Ĉantorio, kaj ĝin oni povas opinii la bazon de tradicia, ĝis nun ĉiujare okaziganta esperantista renkontiĝo. La regulaj renkontiĝoj de delegitoj tre rapide ŝanĝiĝis en publikajn esperantistajn renkontiĝojn kun ĉeesto de dekoj eĉ centoj da samideanoj. Jam tiun unuan „Ĉantorion“ partoprenis 68 personoj, inter tiuj eĉ 27 esperantistoj el Pollando. La programoj de tiuj renkontiĝoj estis tre variaj, ili havis erojn seriozajn, sed ankaŭ sociajn kaj distrajn. Tiuj ĉi regulaj aktivaĵoj bone influis progreson de la movado, memkompreneble pleje en Ostrava-regiono.

Provo imiti similan agadon en alia regiono – ekzemple ĝin iniciatis A. Kudela en Olomouc – ne sukcesis. Fine la organizintoj de la renkontiĝoj venis al decido fondi novan asocion, kiu kapablu pli efike organizi la Esperanto-movadon en la regionaj kondiĉoj. Tio fakte realiĝis 9. 11. 1930 en vilaĝo Stonava, kiam la kunveno estis proklamita la lasta kunveno de la delegitoj kaj laŭ propono de Fr. Skulina el Ĉ. Těšín anoncita kiel unua kunveno de preparkomitato de nova asocio. Tuj estis elektita la preparkomitato surfrunte kun L. Krysta el Ĉ. Těšín, kiu poste estris la asocion ĝis la milito.

La preparkomitato devis komence solvi bazajn kondiĉojn por fondo de nova organizaĵo. Dum Český Těšín estis unuanime aprobita kiel sidejo, la nomo vekis viglan diskuton, ĉar temis pri regiono situanta en du historiaj landoj – Silezio kaj Moravio. Fine oni evitis uzi landnomon kaj akceptis la neŭtralan nomon Regiona Esperantista Ligo. Poste oni kompilis statuton, principojn de agado kaj plenumis kun certaj malfacilaĵoj laŭleĝajn postulojn. La prepartempo finiĝis 20. 9. 1931, kiam okazis la fonda kunveno en Český Těšín kaj la nova Esperanto-asocio komencis sian aktivan agadon. Tiu estis multfaceta kaj respektis la fakton, ke la loĝantaron en la regiono formas ĉeĥoj, germanoj kaj poloj. La asocio propagandis Esperanton kaj ĝian movadon liverinte multajn informojn al regionaj ĵurnaloj kaj al radiostacio Ostrava, kiu tiam elsendis ankaŭ en kaj pri Esperanto, eldonis informajn kaj varbmaterialejn, pro specifa regiona loĝantaro en la ĉeĥa, germana kaj pola lingvoj. La asocio organizis diversloke multajn Esperanto-

kursojn, kiuj estis gvidataj en ĉiuj tri lingvoj, ofte de la sama instruanto, ĉar scio de ili estis en la regiono kutima. Por la kursoj plej konvenis pro diversnaciaj lernantoj la Ĉe-metodo, tial REL organizis provlecionojn, presigis kaj al instruontoj liveris necesajn instrumaterialojn. Fojfoje la malfermo de la kurso aŭ transdonado de atestiloj al la sukcesaj frekventintoj okazis kun ĉeesto de publiko aŭ lokaj instanculoj, ekzemple en Karviná la 10. 4. 1932 ĉeestis la kursofinon 105 personoj, plejparte tio ne estis lernintoj. Oni ankaŭ daŭrigis organizadon de regulaj renkontiĝoj laŭ la sama sistemo kiel menciite ĉe delegitoj. En la programoj oni informis pri ĉiuj eventoj en la movado regiona kaj ĝenerala, ofte la programon plenumis distraj partoj. Krom Esperanto oni uzis ankaŭ iun el la naciaj lingvoj depende de la ĉeestantaro, ĉar ne ĉiuj partoprenantoj Esperanton sufiĉe regis. Ne mirinde, nombro da ili ofte superis centon. Por efike konatigi Esperanton al publiko la asocio organizis diversajn kulturajn programojn, Zamenhofajn vesperojn kun artaj programoj, prelegojn de ĉeĥaj kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj, danke al bona propagando ĉiam kun nombra ĉeestantaro. En agadprotokoloj estas dokumentitaj ekzemple 140 vizitantoj en muzika akademio en Radvanice 26. 3. 1933, 104 personoj en Zamenhofa vespero 11. 12. 1932 en Mariánské Hory, 450 ĉeestantoj en la amika kunestado kun esperantisto Kola Ajayi el Nigerio la 9. 4. 1933 en Karviná. Estono H. Seppik prelegis dum sia rondvojaĝo 1936-1937 pri sia lando, el entute 28 publikaj paroladoj tra tuta respubliko 22 okazis en la agadregiono de REL antaŭ tricenta ĝis sepcenta aŭskultantaro.

En la regiono estis aktivaj Esperanto-kluboj i. a. en Ostrava (kelkaj), Ĉ. Těšín, Třinec, Karviná, Lazy, H. Suchá, Stonava, Orlová, Jablunkov, Bohumín, Radvanice, Místek, Příbor, Kopřivnice ktp. En la jaro 1936, kiam REL komencis trakti kun la naskiĝanta unueca esperantista organizaĵo en Ĉeĥoslovakio (tio fine estis EA ĈSR) la asocio havis 330 membrojn.

Inter iniciatintoj kaj ĉefaktivuloj estis la plej meritintaj A. Rossmanith, J. Gunia, L. Krysta, Jar. Hladký, Fr. Skulina, K. Adámek, J. Balicki, E. Poncza, E. Eisenberg, E. Chudoba, A. Kohutek, Ing. L. Krajc, Fr. Petrak, E. Sebera, Vl. Slaný, A. Kermel. Kelkaj el ili movadumis ankaŭ post la milito.



Nový Bohumín 1934

La plej videbla postrestaĵo de REL aktivaĵoj estas la komence menciitaj Esperanto-monumentoj. La ideon oni kaptis laŭ modelo en Olomouc, kie en la jaro 1932 estis plantita „Esperanto-arbo kun memorŝtono“. Post akiro de urbestrara konsento estis kun ĉeesto de vasta publiko en loka parko en Ĉ. Těšín oficiale plantita la 23-an de oktobro 1932 la Esperanto-arbo kaj REL komencis la monokolektadon por monumento. Post unu jaro la kolektita sumo permesis la monumenton mendi, sed la estraro de Ĉ. Těšín revokis sian antaŭan

konsenton.

La iniciativon do transprenis esperantistoj el Bohumín kaj danke al J. Kermel, K. Adámek kaj Wittoschek estis la monumento oficiale 4. 11. 1934 inaŭgurita kaj transdonita al la urbo. Sed sorto ne estis al la monumeto favora. Politikaj kondiĉoj fine de la tridekaj jaroj kaŭzis, ke ĝi perdiĝis. Tial post la revivigo de la klubo en Bohumín estis danke al J. Kermel kaj aliaj novaj esperantistoj instalita 5. 10. 1947 nova monumento, kiu ekzistas ĝis nun.

Tiu ĉi memoraĵo estas fakte la lasta spuro de REL, ĉar sur la invitilo al la inaŭguro estas krom la klubo kiel invitinto nomita Regiona Esperantista Ligo.

Sed kiam fakte REL finis sian agadon ne estas klara, ĉar neniu dokumento tion deklaras. Ŝajne eblas supozi, ke ĝi malaktiviĝis jam en lastaj jaroj de la unua respubliko. La asocio, kiu deklaris sin kiel „internacieca“, ĉar ĝi ne nur statute, sed ankaŭ reale samrajte anigis esperantistojn de tri nacioj, en tempo de progresanta naziismo ĉe germanoj kaj kontraŭĉeĥoslovakaj sintenoj ĉe poloj apenaŭ povis sukcese agadi.


Tamen la iama aktiveco de REL havis sian epilogon. Post du jaroj tute hazarde estis dum terlaboroj en Bohumín trovita la origina monumento. Tiam ekagis Esperanto-klubo „Komenský“ el Ostrava-Zábřeh, kiu la trovitaĵon transprenis, renovigis kaj dediĉe al J. A. Komenský instalis en eta parko ĉe la ĉefvojo Rudná. Tial la oficiala inaŭguro 11. 5. 1952 estis la definitiva punkto post Regiona Esperantista Ligo.

Vl. Kočvara

Lernado de pacienco kaj humileco

Kuŝante surdorse jam la trian semajnon mi strebis rememori la momenton, kiu tiel abrupte ŝanĝis miajn planojn kaj ĝis nun mi ne povas decidiĝi, ĉu mi sentu pli da malfeliĉo aŭ pli da feliĉo. Mi preskaŭ ne rajtis moviĝi; sed povintus esti multe pli malbone.

Ke mi dum la belega vetero de la paska dimanĉa posttagmezo aerplenigis la aertubojn de mia biciklo kaj startis la unuan fojon post proksimume kvar jaroj la aktivadon, kiun mi ĉiam ŝatis, estas certe kompreneble. Kaj mi vere ĝuis la veturadon sur la biciklo-pado de Dobřichovice al la praga urboparto Radotín, pli kaj pli rapidigante kaj en mia interno fierante ke mi denove povas. Kvazaŭ junulo!



Proksimume duonvoje mi rigardis kun intereso dekstren trans la riveron Berounka kaj admiris tie paŝtigantajn ĉevalojn. Sed ho ve!!! Post la rerigardo

antaŭen mi ekvidis antaŭ mi starantan debicikligintan virinon, kaj estis klare, ke la karambolo estas neevitebla. Por ne kolizii kun ŝi, mi krom bremsado subite rektangule ŝanĝis la direkton kaj maldokstren kaj dekstren, kaj jam mia korpo ekflugis tra la aero.

Kuŝante en doloroj surtere mi klare rememoris, kiel mi hejme antaŭ la ekvojaĝo decidiĝis, ke mi planas veturi nur sur la biciklo-pado, ne surŝosee, do pro manko de danĝero ne necesas surmeti kaskon. Sed nun kuŝante surtere mi konstatis, ke kasko tamen troviĝas sur mia kapo. Mi ne havas alian klarigon, ol ke mia gardanĝelo surkapigis ĝin al mi por savi mian vivon, ĉar mi kuŝis per la kapo sur la betonrando inter la asfalta

biciklista vojo kaj herbejo.

Ambulanco, malsanulejo, covid-19-kontrolo, rentgena esploro, fine verdikto: tre komplika rompiĝo de la brako, vundo de kubuto kaj rompita femurkolo en kokso.

Atendante komplikan operacion de la brako mi devis solvi la ricevitan demandon rilate al la femurkolo. Ĉar ĝi estis rompita, tamen la kontaktpartoj ne ŝoviĝis flanken, mi povis esprimi mian preferon, ĉu

provi atendi, ĉu la rompitaĵo kunkreskos (min. ses semajnojn, sen garantio), aŭ post la operacio de la brako subiĝi al dua, nome la enmeto de artefarita kokso.

La operacio de la brako daŭris pli ol kvar horojn kaj post preskaŭ kvinhora kompleta anesteziio mi sentis min tre malkomforte. Eble pro tio mi decidiĝis prefere lerni paciencon kaj esperi, ke la rompitaĵo en la kokso kunkreskos.

Dum la kuŝado mi havis sufiĉe da tempo por cerbumi ne nur pri la nuna stato, sed ankaŭ pri ĝia kaŭzo kaj pri mia ĝisnuna kaj venonta vivo. Kaj kiel eterna optimisto, kiu ĉiam ĉe ĉio serĉas pozitivajn trajtojn, mi trovis plurajn pozitivajojn ankaŭ ĉi-kaze.

Unue, mi vivas, kio ne devus esti, se mi ne surhavirus la kaskon. Due, vundita estas la maldekstra flanko de mia korpo, do ekde la kvara semajno mi jam povis uzi la komputilon kaj labori, kion mi per la maldekstra mano apenaŭ sukcesus. Trie, mia poŝtelefono restis nedamaĝita, do eĉ kuŝante surdorse mi povis resti telefone (kaj kun limigoj ankaŭ rete) en kontakto kun miaj amikoj kaj laborpartneroj. Kaj plie, mi eksciis, ke danke al miaj perfektaj amikoj kaj kolegoj mia eldonejo povas funkcii ankaŭ sen mi.



Kun lambastonoj en loĝejo

Kiel burĝo mi do maldiligentis enlite, kaj telefone disdonadis ordonojn, kiu kion faru! Tiel estis laŭplane transdonitaj en presejojn la datenoj por du novaĵoj en

la ĉeĥa, danke al Jindřich Košťálek (al kiu mi pro tio publike dankas) estis ekspedita stoko da novaj libroj al Belgio, kiuj estis dume finproduktitaj por Flandra Esperanto-Ligo, kaj daŭrigis la traktado kun SAT kaj la presejoj pri la baldaŭa produkto kaj dissendo de PIV 2020.

Kaj ĉefe, krom la pacienco mi devis lerni (kaj ankoraŭ lernas, ĉar mi skribas tion en rekapablaga hospitalo, kie mi ankoraŭ konvaleskos ĝis nun nekonata tempo) ankaŭ humilecon. Nur nun vundita mi ekkomprenis, ke mi estis en mia egoo tro fiera pri miaj fizikaj kapabloj, post kiam mi sukcesis per vigla ekzercado kaj ĉiutaga moviĝo (matena gimnastikado, paŝado – ĉi-jare jam ĉiutage min. 10 000 paŝojn – al tio regula naĝado kaj tablotenis) senti min same fizike forta kiel antaŭ la sukcesa sed malagrabla kuracado de kancero, kiu febligis min tiugrade, ke mi ne povis senripoze eĉ supreniri la ŝtuparon al mia loĝejo.

Mi do danke akceptas tiun lecionon de humileco kaj ekkomprenas, ke mi estas normala maljunulo, kiu dum siaj aktivecoj devas konsideri la objektivajn limojn pro aĝo, inter ili ankaŭ pli malrapidan reakcion kaj multe pli facilan rompiĝemon de la ostoj ol dum la juneco.

Kaj kial mi skribas tion? Ĉar laŭ mia sperto negativaj ekzemploj estas pli bone rememoreblaj ol pozitivaj, mi volas per mia ekzemplo averti la legantojn: Estu singardemaj, ĉar vere momento de malatento povas subite kaj tre serioze ŝanĝi vian vivon! Bonvolu ne sekvi mian ekzemplon!

La 22-an de majo 2020

Petro Chrdle

ilustris Pavel Rak

Kion mi faras en la nuna tempo de LA KVARANTENO

(aldono al la Lingvo-anguleto: Kio estas "anekdoto")

Mi legas (krom aliaj aferoj). Nenia surprizo – oni povas atendi, ke tion faras ĉiuj homoj. Oni eĉ povas supozi, ke en la Esperantujo estas aĉetata la sama verko... Sed mi ĉi-tempe ne falis en la kategorion de l' Esperanto legantoj...

Antaŭ cca unu jaro mi aĉetis la anglan libron, kiu havas titolon:

Longitudo. Rakonto pri la izolita geniulo, kiu solvis plej grandan sciencan problemon de sia tempo. (*Longitude. The Story of a Lone Genius Who solved the Greatest Scientific Problem of His Time*). (La aŭtorino: Dava Sobel).

La titolo estas longa; kiel ĝi anticipus la tutmondan ("tutoceanan") aferon, kiu fariĝis nesolvita problemo – nu, de la prehistoria komenco de mar-navigado... Ĝis la 1737, kiam ĝin finsolvis la inventisto **John Harrison**.

Legante lian biografion mi trafis liniojn, kiujn mi senprokraste nomas **anekdoto**. Jen (la citaĵo): *John "Longitude" Harrison naskiĝis la 24an de marto, 1693, en Yorkshire, Granda Britanio, kiel la plej maljuna el kvin infanoj. Lia familio, respektante la kutimon de la tempo, disdonadis inter si la naskiĝnomojn tiel "avarmaniere", ke estas apenaŭ eble sekvi spurojn de ĉiuj Henry-s, John-s kaj Elizabeth-s sen skribilo kaj papero... Oni devas esti preskaŭ inĝenia por ekscii, ke la John Harrison estis filo, nepo, frato kaj onklo ĉu de tiu aŭ de la alia "Henry*

Harrison"... dume lia patrino, lia fratino, ambaŭ liaj edzinoj, lia unusola filino kaj du el liaj duonfilinoj nomiĝis – Elizabeth."

Kiam vi vizitos la Observatorion, Greenwich, G.B. por pied-stari sur la "nulo-meridiano", rememoru la eminentulon John Harrison.

Margit Turková

Rimarko de la redaktoro:

John Harrison (1693-1776) estis brita horloĝisto, kiu solvis problemon difini pozicion de ŝipo naviganta sur oceano per speciala horloĝo, kiu mezuris longitudon.

La alia anekdoto (el la sama libro):

La historio scias pri la astronomo Edmund Halley (1656 – 1742), ni ĉiuj certe pri la Halley-kometo (kiun li "malkovris" en la jaro 1705); kaj pri la rusa caro Petro la Granda (1682 – 1725). Tiu lasta vojaĝadis en diversajn eŭropajn prosperantajn urbojn por persone prilerni diversajn metiojn (cele prosperigi ankaŭ sian urbon Petrogradon).

Avido por la afero alĝvidis lin al Greenwich, kie li luis loĝejon por esti proksime al la ŝipfarejo (en Deptford).

La astronomo kaj la caro fariĝis – drinkamikoj... Je 26 jarojn pliaĝa Halley estis fama "viski-drinkulo" jam dum sia navigado al Kanariaj insuloj (kiam li "serĉis longitudon"). Kaj la caro Petro – la ruso...

Laŭ (legenda?) esprimo de la dommastrino: "... ili dum noktoj diboĉadis kiel lernejinferoj en puŝcaro trapuŝante la ĉirkaŭdoman heĝon."

LINGVA ANGULETO - JAZYKOVÝ KOUTEK

Moto: La versoj havas kaj havos sian valoron tiom longtempe, kiom oni ankoraŭ devos batali **pro** la agnosko **por** Esperanto (L.L.Zamenhof).

Pacient: "Pane doktore, já sem přišel skrz to slepý střevo..."

Kdo by neznal tento "kameňák" - kterému my říkáme *anekdota*. Ale *anekdota* to není!

Co je *anekdota*: *Mallonga, kurioza aŭ sprita rakonto, ofte biografia (PIV)*. Eble oni ne devas aldoni, ke ĝi estu amuziga, humura ...

Jen kelkaj (Anekdotoj pri famaj homoj, Bratislavo, 1992, kompilis Eduard Tvarožek):

ALEKSANDRO LA GRANDA - macedonia reĝo (- 356 -323)

*Aleksandro la Granda iam kritikis piraton **pro** ties malhonesto metio. Sed la pirato nur ekridetis **pri** lia admono kaj diris: – Jes, estas vero, mi estas pirato, sed nur ĉar mi havas unusolan ŝipon. Se mi havus tutan floton, mi certe estus konkeranto.*

HANS CHRISTIAN ANDERSEN - dana verkisto (1805-1875)

*Hans Christian Andersen longe vivis en Italio. Kiam li poste faris ĉion eblan **por** povi definitive forveturi, iu alia amiko demandis lin: – Kial vi ne restas pli longe? Mi ne komprenas, ke vi estas preta forlasi tiun ĉi belegan, sunbanatan landon kaj reveni en la malvarman Danlandon –*

Je tio Andersen respondis:

– Ĉu oni ne amu sian patrinon nur ĉar

ŝi estas malpli bela ol aliaj virinoj? –

*H.C.H.A. estis konata **pro** tio, ke li ne tro zorgis **pri** tio, kiel li estas vestita. Iam iu el liaj konatoj haltigis lin kaj diris:*

– Ĉu tio, kion vi havas sur la kapo, estas ĉapelo?

Je tio Andersen kun bonkora rideto respondis:

– Kaj ĉu tio, kion vi havas sub la ĉapelo, estas kapo?

MARLENE DIETRICH - germana filmaktorino (1901- 1992)

En la ĉeesto de M.D. oni diskutis, ĉu pli inteligentaj estas viroj aŭ virinoj.

*Demandita **pri** sia opinio Marlene respondis:*

– Mi ankoraŭ neniam vidis virinon, kiu postkuras iun stultan viron nur ĉar li havas belajn krurojn.

ALEKSANDRO DUMAS - franca verkisto (1802 – 1870)

*La konatan francan romanverkiston ALEKSANDRON DUMAS PLI AĜAN, faman precipe **pro** liaj "Tri musketistoj", demandis iam unu el liaj admirantinoj:*

– Kion vi faras, majstro, ke vi maljuniĝas tiel admirinde bele? -

– Mi vivas tiel, via sinjorino moŝto, ke mi dediĉas al tio mian tutan tempon – respondis Aleksandro...

ALBERT EINSTEIN - germana fizikisto (1879 – 1955)

*En la jaroj 1911-1912, kiam profesoro Einstein instruis en la Instituto **por** fiziko ĉe la praga germana universitato, li havis en la laboratorio serviston Blaŭstein.*

Tiu ĉi servisto ŝatis drinki kaj tial prof. Einstein, por protekti kontraŭ Blaŭstein la solan botelon da likvoro, kliun li havis kaŝitan en la angulo de la laboratoria ŝranko por eventuala neatendita vizitanto, surgluis sur ĝin avertan slipeton kun la vortoj: "Atentu! Danĝera por okuloj! Einstein." Tamen iun tagon sinjoro profesoro Einstein trovis la botelon nur duonplena kaj sur la slipeto estis skribite: "Prenu tion diablo, unu okulon mi riskas. Blaŭstein."

Tak "jsme zabili dvě mouchy jednou ranou": naučili jsme se rozlišovat co je a co není "anekdoto" a co je "ŝercaĵo" (v češtině za to neručíme!); ale to jen tak "mimoходом." Hlavní téma dnešního jazykového koutku je: jak správně používat předložky (prepozicioj) por – pro – pri...

Por trakti la gramatikaĵon serioze, ni utiligu la koncernan ĉapitron.

(ELLERNU!, Jan Werner, 2019):

Distingu la prepoziciojn pro kaj por.

Předložka **pro** značí příčinu a motiv konání, nikoliv účel konání. Českými ekvivalenty jsou: kvůli, pro, za, z důvodu... Předložka **pro** je zjednodušeným vyjádřením složených předložek (PAG, § 122, jsou nazvány "prepozici-aĵoj": **sekve de, kaŭze de**, kterým odpovídá české "z důvodu". Uvedu několik příkladů ze Zamenhofova díla: *veni pro serioza afero; li amas ŝin pro ŝia beleco; pro kio ŝi ploras? okulon pro okulo, denton pro dento...*

Předložka "pro" se občas nesprávně zaměňuje za předložku **por**, která vyjadřuje účel, tedy cíl konání, nikoliv příčinu konání. Jednoznačné použití před-

ložky **por** je zřejmé v aplikacích: *fari ion por ies honoro, labori por komuna utilo*. Po předložce **por** může následovat sloveso také v neurčitém tvaru (infinitivu), je-li podmět totožný pro obě činnosti: *li estis invitita por kanti; mi venis por diri al vi... (aby zazpíval... abych vám řekl...)*.

Jsou však případy, kdy je obtížné rozlišit, zda se jedná o příčinu (**pro**) nebo účel (**por**) nějakého konání. Například Zamenhof užil vazbu: *fosi pro akvo*, protože kopání bylo motivováno získáním vody. Bylo by však také správné: *fosi por akvo*, protože voda je účelem – cílem kopání. Podobně PAG uvádí: *morti por la patrujo* (kdy blaho vlasti je cílem oběti). Správné je však také: *morti pro la patrujo* – zemřít kvůli vlasti, pro vlast, za vlast.

Resumo en Esperanto

La prepozicio **pro** montras kaŭzon, motivon de iu ago, dum la prepozicio **por** montras celon de iu ago. Sed estas situacioj, kiam estas uzeblaj egale **pro** kaj **por**, la elekto dependas de subjekto, kiu parolas aŭ verkas, ĉu li aŭ ŝi en la koncerna ago subjektive sentas pli kaŭzon aŭ celon de la agado. Ekzemplo: *kanti pro ĝojo* (eble la propra); *kanti por ĝojo* (eble la nia).

Jak vidno, řešení není ani jednoduché ani jednoznačné... Co dělat...

Vraťme se k našemu "kameňáku". Když pomineme směšnost věci, že pacient nepřišel "skrz" (*tra la apendikso*), ptejme se vážně: jaká je **příčina** jeho příchodu: **pro**-tože má zánět slepého střeva... zde se nám šťastně nabízí mnemotechnická pomůcka: esperantské **pro** = české **"pro"** = **pro doloroj de la apendikso...**

Ĉar la lingvon ne eblas ekregi nur per la difinoj kaj gramatikaj reguloj, ni aldonas kelkajn frazojn por ekzerci la koncernan aferon. Ĉiuj ekzemploj estas prenitaj el esperantaj verkoj.

– Antaŭ Petro ili riverencis kaj petegis **por** lia pardono, **pro** tio, ke tiel ili lasis sin erarigi –

– Andreo kaj Ladislao zorgataj **pro** la (malbonaj - M.T.) spertoj en Ĉeĥio, ili prefere dankis **por** la gastigo kaj migris plu –

– Tio estis **pro** ama kaj **pro** politika geedziĝo –

– Andreo pretis rezigni **pro** li parton de sia potenco –

– Neniun skandalis, ke Salomonon oni sidigis sur la tronon – ĉefe **pro** tio, ĉar **por** ambaŭ tio estas avantaĝo –

– Kaj jam venadis aventuremuloj, bienaviduloj kaj ceteraj "**por**-panaj" aventuruloj, solduloj, komercistoj, industriuloj, baronoj –

– Li havis zorgojn **pro** la frato –

"preni por" ve smyslu považovat (se) za něco: (La Fido, Vinko Ošlak, KAVA-PECH 2019):

– La gazeton "Slovanski vestnik", kiun la eklezio **prenis por** la komunisma gazeto

– Kio sin mem **ne prenas por** religio, tamen ĝi tio estas

– Neniu **prenis sin por** viktimo de iluzioj

– Ke la mondo fakte ekzistas, kial do oni tiun banalan konstaton **prenu por** la baza konstato

El la 1-a tutruslanda E-kongreso:

(Dek tagoj de kapitano Postnikov, M. Bronštejn, 2004)

L.L.Z.: - Ekzistas gravaj kaŭzoj, **pro** kiuj

mi elektis **por** mia parolo tiun lingvon, **por** kiu ni batalas kaj **pro** kiu ni kunvenis – Niaj kongresanoj kunvenas **por** aŭdi nian lingvon, **por** kompari sian propran manieron de parolado

– La kongresoj edukas konvinkitajn batalantojn **por** nia afero

A.A. – leviĝis **por** kun dankaj kapklinoj akcepti aplaŭdojn de la gastoj kaj **por** kunfrapeti pokalon kun la apuduloj...

M.Turková

Opavská Nej

En la libro *Opavská Nej* (Plejoj de Opava) troviĝas ĉapitro pri la plej fama kaj tradukata ĉeĥlingva poezia verko, **Sileziaj kantoj** de Petr Bezruč (p. 80-83). La aŭtoro de la ĉapitro Jiří Šil mencias jenajn lingvojn, en kiuj la verko jam aperis:

albana, araba, angla, belrusa, bulgara, ĉina, Esperanto, estona, finna, franca, germana, greka, hungara, interlingua, japana, korea, kroata, latva, luzacia, malta, nederlanda, norvega, pola, romaa (cigana), rumana, rusa, slovakia, slovena, serbokroata, serba, sveda, ukraina.

Inter la 31 lingvoj vi certe rimarkis du artefaritajn planlingvojn, Esperanton kaj interlinguan. La Esperanta traduko estas eĉ prezentita per titolpaĝo.



mm

Benešov

De la telefona interparolado kun anino de nia E-klubo mi eksentis triston. – La sinjorino estis ĉiam vigla – ŝi gvidis rondeton de trikado, vizitis rondeton de biblia legado, ĉeestis sanktajn mesojn en preĝejo, vizitadis Esperanto-klubon kaj havis eĉ aliajn aktivecojn.

Nuntempe dum la "korona tempo" ŝi estas preskaŭ fermita en sia loĝejo en Seniordomo kaj plendas pro manko de kontaktoj kun konatuloj kaj ankaŭ anoj de la E-klubo. Por ĝojigi ŝin kaj ankaŭ por kunveni post longa tempo ni, E-klubanoj, renkontiĝis sur strato, sub fenestroj de la Seniordomo kaj de tie ni interbabilis kun la sinjorino, estanta ĉe malfermita fenestro en tria etaĝo de la domo.

La babilado ne estis tro komforta, sed tamen - ni renkontiĝis, interparolis kaj tiamaniere ĝojigis nin reciproke.



Kio amuzigis min – mia longjara germana korespond-amikino skribas krom alie pri diversaj aferoj dum la "korona tempo" kaj nomas, kion aĉetas diversaj popoloj en Germanujo: la francoj vinon kaj kondomojn, nederlandanoj drogojn (marihuana), amerikanoj armilojn kaj germanoj nudelojn kaj necesejan paperon. Intere, ĉu ne?

LChal, E klubo Benešov

Kantato

En la aprilo estis eldonita nova poemvolumo de la aŭtorino Věra Ludíková titolita "KANTÁTA 1 + 5. Kiel kutime ĝi estas multlingva, kaj – kiel kutime – ne mankas Esperanta traduko – ĉi-nune de Jaroslav Mráz. La aŭtorino esperas, ke la inaŭgura legado antaŭ publiko okazos "en pli bonaj tempoj".



Svaz zdravotně postižených esperantistů a Esperantský kroužek Dr. Josefa Hradila
srdečně zvou na jazykový seminář
pro:
esperantisty (začínající i pokročilé) a
příznivce procházek v kouzelné krajině Českého ráje



**Seminář
se bude konat
v hotelu Kavka
v Malé Skále
v termínu 17.-20.9.2020**

Příhlášky a informace:
Lenka Angelová
tlf: 775 323 903
l.angelova@seznam.cz
aeh@esperanto-aeh.eu
<http://esperanto-aeh.eu/>
V případě nepříznivého počasí si ve volném čase
vyrobíme malou, ale užitečnou maličkost.
<http://evinatelier.cz>

Donaco

Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen kaj Stano Marček decidis donaci al la esperantistaro, en tiu ĉi malfacila tempo, kiam multaj el ni devas esti hejme, novan *Aŭskultejon*, kie oni povas trovi libere aŭskulteblajn sonlibrojn kaj kantojn: t1p.de/auskultejo1

Júlia Sigmond kaj Sen Rodin

Geedzoj kaj verkistoj Júlia Sigmond (1929-2020) kaj Filippo Franceschi, plum-nome Sen Rodin (1932-2020) forpasis pro koronaviruso ĉi-marte.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940 členství ČES
- 06941 členství UEA
- 06942 předplatné Starta bez členství
- 06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944 poplatek UK
- 06945 kongres EEU
- 50400 komise pedagogická ILEI
- 50401 písemný kurs začátečníci
- 50402 písemný kurs pokročilí
- 50404 Paroliga kurso
- 50405 svazové zkoušky
- 50800 sekce nevidomých LIBE
- 50900 sekce zdravotníků UMEA
- 51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200 sekce informatiky
- 70100 komise pro tisk a inf.
- 80200 ediční fond
- 80300 propagace v tisku
- 80400 fond Tilio
- 80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1320,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 820,-Kč
Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč
Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

JUBILEANTOJ DE APRILO, MAJO KAJ JUNIO

Otilie Barešová, Bohuňovice – Kolín
Miroslav Baroš, Ratiboř u Vsetína
Stanislav Droppa, Šumperk
Pavel Dvořák, Svitavy
Milena Jelínková, Jilemnice
Doc. MUDr. Jaroslav Max Kašparů
Milan Krupička, Volary
Jana Křížková, Lanškroun
Stanislav Mudroch, Svitavy
Ria Pospíšilová, Semily
Ing. Jan Rýznar, Lovosice
Vlasta Stará, Benešov
Václav Štěpánek, Praha
Ing. Jiří Tomeček, České Budějovice
Zdeňka Vítová, Tábor

**Al ĉiuj jubileantoj sincerajn gratulojn!
Fartu bone, estu sanaj!**

**Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
51. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117**

Uzávěrka příštího čísla: 15.8. 2020

--

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
51-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.8.2020**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO 2020

2020-07-19/2020-08-01 Unua etapo de Lančov (temo: Alico en Mirlando)

2020-08-02/14 Dua etapo de Lančov (temo: Antikva Egiptio) <https://www.set-lancov.cz>

2020-08-14/16 Renkontiĝo de Eksaj Tendaranoj en Lančov, Info: let.lancov@seznam.cz

2020-09-04/06 Svitavy: Aŭtuna renkontiĝo en Esperanto-Muzeo Info: cea@esperanto.cz

2020-09-17/20 AEH-seminario en hotelo Kafka en Malá Skála l.angelova@seznam.cz

2020-09-25/27 Konferenco de Ĉeĥa Fervojoj Esperanto-Asocio NULIGITA cefea@centrum.cz

2020-10-9/11 Konferenco de ĈEA en Pardubice, Info: cea@esperanto.cz

2020-11-12/15 IEL Bartošovice
<https://lernej.weebly.com>

Eksterlande

2020-08-01/08 La 105-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo (Kanado), Retejo:

NULIGITA!!!

2020-08-08/15 La 70-a KELI-Kongreso en Legnica (Pollando), Info: pomer@wp.pl

2020-08-22/29 Itala Kongreso de Esperanto, retejo: <https://kongreso.esperanto.it/87/>

2020-09-02/10 53-a Internacia Feriado en Ladek, Pollando (proksime al la ĉeĥa landlimo) restado 220 Eŭroj, Info: pomer@wp.pl,
<http://vroclavo.pl>

2020-10-01/04 KAEST en Modra: Scienco kaj tekniko kiel rimedoj por efektivigi daŭripovan evoluon
<https://kaest2020.ikso.net>

SES online

Somera Esperanto-Studado, planata por Kroměříž, estas prokrastita al 2021 pro la pandemio. Ĉi-jare okazos la kurso nur virtuale.

Aliĝo por Ĉeĥio 45 Eŭroj (post 4.7. kun krompago 10 Eŭroj)

<http://www.esperanto.cz/cs/akce/letni-skola-esperanta-online-1210.html>






Klubanoj de Svitavy en ekspozicio "Cirko en Litomyšl"



Ovofritaĵo de EK Ostrava



Tradicia renkontiĝo netradicie (Šumperk)



La unua kunveno de la praga klubo post la koronviroza paŭzo (11.6.2020)

Muzeum Brněnska — Památník pisemnictví na Moravě



FRANTIŠEK KOŽÍK (1909–1997) spisovatel, dramatik, scenárista, textař, dramaturg a esperantista, autor románu *Největší z Pierotů*

18. 3. 2020 – 30. 12. 2020

Muzeum Brněnska
Památník pisemnictví na Moravě
Klášteř 1, Rajhrad

www.muzeumbrenska.cz
muzeumbrenska



Ekspozicio pri František Kožík kiel verkisto kaj esperantisto



Postpandemia kurso en Svitavy